UNUA JARO. — N° 1 | Unu Numero : 10 CENTIMOJ | DIMANĈO 18 JUNIO 1905

★ ESPERANTO ★

PROPAGANDA ĴURNALO POR LA LINGVO HELPA INTERNACIA
DE L. L. ZAMENHOF

ADMINISTRADO : S° Paul BERTHELOT, CÉRET (P.-O.) Franco

ABONOJ
24 numeroj sinsekvaj : 3 fr. por la tuta mondo
REKLAMO-ANONCOJ
AGENTO GENERALA : S° EMILE GASSE
71, str. Michelet, LE HAVRE (Seine-Inférieure).

REDAKTADO : S° Ch. LAMBERT
10, str. Berbisey, DIJON (Côte-d'Or), Franco

Al Leganto

« Ankoraŭ unu gazeto esperantista ! — vi certe ekkriis vidante tiun jurnalon — ĉu ne estas jam sufiĉe, eble jam tro, ĉar kelkaj nur kun peno vivadas ! Kial tiu nova organo ? »

Al tiu demando ni volas respondi.

Vera esperantisto estas esence propagandisto. Kiam, en tempo de malfacileco, iu kredis eksenti la veron, aŭ eĉ malgrandan parton de verajo, ĉiuj emoj socialaj kaj altruistaj estantaj en li puŝas lin energie al proselitismo, al propagando. Tiu neneigebla fakto estas unu el la naturaj instinktoj de nia raso, unu el tiuj emoj kiuj apartigas homon de la besto, la kondiĉo esenca de l'klerigo kaj progreso.

Sed antaŭ alveni al tiu stato, kie la penso estas kiel formiko trenanta grenegon malgraŭ obstakloj kaj laciĝo kun la fiksa ideo de l'devo plenumota, antaŭ tio la estonta esperantisto ĉirkaŭflaras, ekprenas, delasas, foriras, revenas laŭ la eksteraj cirkonstancoj, kiuj lin altiras aŭ forlogas.

Tiun ŝancelatan spiriton, kaj tia estas nun la plej multo de kleruloj eŭropeaj, la propagandisto devas ĉirkaŭkapti per sencesa revekigo de l'ideo, per ĉiaspeca kaj multe forma maniero rekonduki ĝian penson al la afero.

Tial estas bonega kaj laŭdinda la entrepreno de tiuj komercistoj kiuj donas al siaj fabrikajoj la nomon *Esperanto* : plumoj Esperanto, ĉampanvino Esperanto, bicikletoj Esperanto, k.t.c. tiel ke almenaŭ la *Vorto* ĉirkaŭvolvu la tutan vivon kaj sentigu la enradikiĝon porĉiaman de nia afero en la homa civilizacio.

Sed tiu ŝtofa propagando, kompreneble, ne sufiĉas. Bezonas io, kion la homo apetitigita per la reklamo povus doni kiel satigo al sia scivolemo. Tial oni kreis gazetojn kaj broŝurojn.

Niaj gazetoj ĝisnunaj estas monataj revuoj pli malpli artaj, literaturaj kaj... kostaj. Preter tio ke ili nur malmulte interesas la publikon *ekster*-esperantistaran, ilia prezo malpermesas ilin disdoni, dissemi, laŭ la parolo de l' poeto :

Cent semoj perdiĝas, mil semoj perdiĝas,
Ni semas, kaj semas konstante.

Jes, almenaŭ se la semo ne kostas tro kare po hektolitro ! La rolo de niaj revuoj ne estas tia. Ili utilas tre bone por kunligi la membrojn de siaj fermataj *eklezioj*, por perfektigi ilian konon de la lingvo kaj ankaŭ por permesi interŝanĝon de malagrablaĵoj pli malpli dolĉaj inter si. Ili estas io kiel la prakristanaj « Aktoj de l'Apostoloj » sed ne multe signifas por la *Gentiloj*.

Broŝuroj multe pli bone taŭgas por tiuj ĉi. Mi memoras precipe la bonegan broŝureton 2-kopekan de D° Zamenhof, la fama n° 86 kiun malfeliĉe oni ne plu povas trovi en vendejoj.

Sed la tempo de broŝuroj jam pasis. Ili ne estas nun sufiĉaj kaj baldaŭ ankaŭ malpli, por la ĉiutaga batalado kiun ni devos militi kontraŭ la malbonvolo, la ofenditaj interesoj, la eternaj antaŭjuĝoj kiuj fariĝos des pli atakemaj ke ni estos pli fortaj kaj danĝeraj por ili. Ni alportas bonon al la homaro, sed kiel ĉiam en tia okazo, ni renkontos homojn kiuj profitas, kiuj *vivas* el la antaŭa malbono kaj kiuj utilos ĉiujn nerektajn rimedojn por perdi nian aferon en la publika spirito. Oni ja vidis tion en la raporto tiel malbonintenca de S° Rozet antaŭ la franca ĉambraro, raporto kiun presis la *Journal Officiel* kaj represis ĉiujn gazetojn malamikajn al nia afero. Al tio ni respondis kiel ? en ntaj privataj gazetoj, parolante *al ni mem*, kaj lasante la malbonan impreson tutan por la ekstera publiko.

Estas neeble ke tia stato daŭru. Ni devas malfermi la fenestrojn kaj alparoli la grandan publikon, kontraŭbatali la malamikojn, interesi la indiferentulojn, decidi la ŝanceligantojn. Por tio bezonas jurnalo grandformata, multekzemplera, en lingvo komuna, disvendata, disprunta, disdonata al ĉiuj, disputanta la hodiaŭa demando, la hodiaŭa kontraŭdiro, senĉese informantan ĉiun klerulon, ĉiun kiu scias legi pri la vivo kaj vivemeco de l'entrepreno esperantista.

Tial ni fondis tiun jurnalon. Komencas ĝi iom malgrande, iom malofte ; sed baldaŭ, ĉar ĉiu komprenos la necesecon nepran de vera jurnalo por nia afero, la formato povos grandiĝi kaj la ofteco multiĝi. Por tio sufiĉas, ke ĉiu klopodu por divastigi tiun folion : ni mem scios fari la eblon por rekompenci efektive la servojn kiujn oni oferos al l'entrepreno. Necesas ke nia gazeto estu ĉie, en vendejoj, legejoj, kunvenejoj, ke oni ĝin trovu sur la ŝipo, en la stacidomo de l'fervojo, en la kafejo, sur la strataj kioskoj, en la manoj de l'promenantoj. Ju pli grandiĝos la nombro da ekzempleroj disvendataj, des pli malgranda estos la kosto de l'ekzemplero pogrande kaj des pli multajn por la sama prezo povos ricevi niaj helpantoj. La batalo komencas, ŝpari kartoĉojn estus malakcepti la venkon !

ANTAŬEN !

NOVAJ SCIIGOJ
pri la
ESPERANTISTA KONGRESO
en Boulogne-sur-Mer

OFICIALA MALFERMO : La 5aa de Aŭgusto 1905 postagmeze.

La 6aa, 7aa 8aa kaj 9aa ; grava kunvenoj en kiuj oni disputados kaj vo donos pri la centra komitato kaj aprobos la netu eblajn regulojn de nia lingvo ; ĉiuj kiuj intencas prezenti projektojn devas tuj komuniki ilin al komitato organizanta.

La 10aa : ekskurso en Anglolandon ; visito de la kvin havenoj esperantistaj.

La sekvantajn tagojn : variaj distraĵoj kaj vizito de najbaraj grupoj.

PUBLIKIGO PRI LA KONGRESO

Ne nur por alvoki niajn ĉiulandajn samideanojn, sed precipe por fari grandan impreson sur la indiferentuloj, vasta publikigo estas tute necesa. La plej efika rimedo por tio, estas la afiŝado de reklamoj en la plej vizitataj lokoj. La organiza komitato ne povas ĉion fari kaj ĝi decidis sin turni per tiu ĉi alvoko al la plej gravaj kaj sindonaj grupoj ĉiulandaj por ke ili organizu en siaj urboj la afiŝan reklamon. Ke ĉiu grupo kiu bonvolas aprobi tion, skribu al ni kiel eble plej baldaŭ por recevi la taŭgan tekston.

LOĜADO

Ĉar ni nun ne povas scii kiom da kongresanoj lo os en Boulogne, ne estas eble garantii ĉambrojn por iuj kiuj venos lastan momenton. En la banaj urboj, kvankam oni trovas ĉiam multe da ĉambroj neokupataj tamen la profesiaj luigantoj, esperante luigi por la plej granda parto de la sezono, ne ŝatas, longatempe antaŭe, kontrakti nur por kelkaj tagoj. Pro tio, la grupo de Boulogne organizas komisiitaron de loĝado, kiu enregistros la luoteblajn ĉambrojn. Dum la kongreso estos oficejo esperantista kiu ĉiumomente donos la utilajn sciigojn. Kompreneble ĉiuj kiuj intencas pasigi la someran sezenon en Boulogne povas tre facile, de nun, trovi la necesan loĝejon. La geesperantistoj kiuj deziras jam mendi ĉambrojn nur por kelkaj tagoj bon volu skribi al ni :

1e Kiun tagon ili alvenos ; 2e la daŭron de la ĉeesto ; 3e la prezon maksimuman kiun ili pagus ; 4e la apartajn dezirojn pri vivado, nombro de ĉambroj, k. t. p. La komisiitaro tuj klopodegos ĉiujn mendantojn plej bone kontentigi.

KARTOJ KAJ LIBROJ DE KONGRESO

Ĉiuj esperantistoj kiuj sendis 3 frankojn kiel simpla aliĝo ricevos, *dum Junio*, siajn kartojn. La aliaj, kiuj pagis almenaŭ 5 frankojn ricevos kune kun la karto, detalajn programojn, ilustritan gvidlibron de Boulogne kaj de la kongreso.

La *Kongresa Libro* konsistas el : 1e historio de la kongreso ; 2e detalaj programoj ; 3e gvidlibro por la vizito de Boulogne ; 4e planoj kaj ilustraĵoj ; 5e frazlibro esperanta-franca por turistoj ; 6e komercaj esperantaj reklamoj.

Kelkaj grupoj prave pensis ke la aliĝaj prezoj ne sufiĉos por egaligi la elspezojn. Tial ili sendis al ni monoferojn kiujn ni danke ricevis. Ni esperas ke tiu-ĉi ekzemplo ne restos izolata.

KONGRESA KUNVENEJO

Kongresaj kunvenoj okazos ĉiuj en la Urba Granda Teatro en kiu estos plie ekspozicio esperanta kaj oficejo pri sciigoj.

VESPERKUNVENO KUN NACIAJ VESTAĴOJ

Multe da fremduloj promesis alporti naciajn kostumojn. Ankaŭ francoj venos kun regionaj vestaĵoj. Ni tre insistas por ke oni klopodu por sukcesigi tiun originalan feston kiu konsistos el koncerto, festeno kaj balo.

KONCERTOJ

Jam kelkaj teatraĵoj kaj muzikaĵoj estas promesitaj ; ĉiu kiu povas kanti aŭ deklami bonvolu sciigi al ni detalojn pri tio.

ALIĜINTAJ GRUPOJ

200 grupoj jam sendis aliĝon. Kelkaj el ili sendas pli ol 20 delegatojn. Do oni povos certigi ke la Universa Kongreso havos grandan sukceson ; ĉiu vera esperantisto, malgraŭ malfacilaĵo, devos nesre veni, por helpi la definitivan venhon.

INTERNACIA LIGO
Esperantista

Okaze de la estonta grava Esperantista Kongreso en *Boulogne-sur-Mer* estas jam proponitaj kelkaj projektoj por fondo de iu « Internacia Ligo Esperantista » regota de iu « Centra Komitato ». Verŝajne, ĝis aŭgusto proksima, aliaj projektoj estos ankoraŭ proponitaj kaj fine la Kongreso decidos.

Multaj el la novaj amikoj de nia afero kredas, ke tiu propono estas tute nova, ke ĝis nun oni neniam ekprovis kunligi la fortojn de la Esperantistoj, kaj ke tiu fondo estas afero facila, kiu alportos al nia entrepreno grandan potencon.

Ho ve ! ili nescias, ke jam almenaŭ oficiale, *du* fojojn D° Zamenhof ekprovis efektivigi tian Ligon, kaj ke du fojojn la afero malsukcesis. Ŝajnas do al mi utile mallonge rakonti, laŭ la oficialaj dokumentoj elĉerpitaj el nia iama gazeto « La Esperantisto », la Historion de tiuj du malfeliĉaj ekprovoj. Eble, post tiu averto de la Historio, la kongresanoj, konante la kaŭzojn de la antaŭaj malprosperoj, evitos la malbonajn paŝojn, kiuj povus denove ruinigi la projekton.

***

Kiam D° Zamenof, en la jaro 1887a, publike eliris kun sia lingvo, li eldonis en kvin lingvoj (rusa, pola, franca, kaj germana) la unuajn malgrandajn lernolibrojn de la lingvo enhavantajn gramatikon kaj fundamentan vortareton. La tekstojn originalajn de tiuj unuaj lernolibroj, oni retrovos en la « Fundamento de Esperanto » nun en presado.

Post tiuj unuaj lernolibroj, la aŭtoro de la lingvo eldonis sian « Duan libron » kaj poste « Aldonon al la Dua libro » en kiuj li klarigas siajn ideojn pri la estonta evoluado de la lingvo kaj ĝia disvolviĝo. Tiam la Amerika Filozofia Societo intencis organizi vastan kongreson por esplorado de la demando pri helpa lingvo internacia. La Amerika Filozofia Societo ŝajne estis sufiĉe favora al Esperanto, kaj D° Zamenhof anoncis en la suprecititaj verkoj, ke li fordonas la sorton de sia lingvo al tiu Kongreso. Tamen en la « Aldono al la Dua Libro » li konsilis, ke en la okazo se la Kongreso Amerika ne efektiviĝos, la Esperantistoj faru mem kongreson aŭ fondu akademion ne pli frue ol en la jaro 1893.

Pasis 1 1/2 jaroj, kaj la kongreso ne okazis kaj la amerika societo tute silentis pri la demando. Tiam multaj Esperantistoj tedataj de tro longa atentado, opiniantaj — verŝajne prave — ke la propono de la amerika societo dronis en la ondojn de l'forgeso, instigis D° Zamenhof al tuja agado kaj fondo de Esperantista Ligo.

D° Zamenhof cedis laŭ iliaj petegoj kaj en la decembra numero de sia gazeto, en la jaro 1889a, li sciigis ke li intencas fondi tian Ligon.

La proponata regularo de la fondota Ligo aperis en la numero de l'25a de Marto 1890 de « La Esperantisto », presita samtempe en la lingvoj germana kaj Esperanto. Tin projekto de regularo, kiu konsistis el 19 longaj detalaj paragrafoj, estas multe tro vasta por ke ni povu represi ĝin. Ni do nur rapide donos ĝian esencon. Laŭ la § 1, la ŝajna sola celo de Ligo estis la *disvastigado* de la lingvo en la tuta mondo ; sed la Ligo devis esti regata de *internacia akademio* kaj la § 10 anoncas ke « la aferoj tuŝantaj la tutan Ligon, *kiel ekzemple la perfektigado de la lingvo*, sin trovas en la manoj de la akademio ». La paragrafoj 14, 15, 16 antaŭvidas kiamaniere oni povos fari *artan ŝanĝon en la lingvo*. Laŭ la paragrafoj 14 kaj 15, tiuj ŝanĝoj estas deciditaj de la akademio, sed la § 16 donas rajton al iu ajn klubo (eĉ eble konsistanta el deko da personoj aŭ malpli) kontraŭstari al tiu decido kaj elvoki voĉdonadon universalan, sekve senfinan disputadon pri tiu *reformo*.

700.090-F.Esp.
1
1905
1-15

★
HEJMA BIBLIOTEKO
Ivan H. Krestanoff
Pirdop-3 Igario

Cetere la §§ 4 kaj 5 difinis, ke ĉiu Ligano pagos kian otizajon, kiu estos almenaŭ 20 pfenigoj ĉiumonate, t.e. *almenaŭ 3 frankoj ĉiujare*. Fine la § 12, difinante la metodon por elekto de akademio enhavis tiun perlon : « ĉiu, kiu deziras fariĝi membro de la akademio, dissendos ne pli malfrue ol en la monato septembro al ĉiuj kluboj sciigon pri sia deziro. »

Kio okazis estas facile divenebla. Neniu volis pagi la tri petatajn frankojn ; ĉiu volis fariĝi akademiano, kaj nur la modestaj kaj seriozaj viroj sin detenis ; kaj *precipe* la pordo al reformoj, tiu danĝerega instigilo al malpaco kaj al disputoj larĝe malfermiĝis !

De tiam komenciĝis senfinaj artikoloj « pri la ŝanĝado de la lingvo » kaj tio daŭris dum la tuta jaro.

Fine senkuraĝigita Dº Zamenhof skribas en la decembra numero de 1800 : « Apenaŭ en la nº 3 montriĝis nia invito fondi Ligon, mi komencis ricevadi de multaj flankoj avertojn kontraŭ tiu ĉi paŝo. Sinjoroj Einstein, Grabowski, de Wahl, de Majnov, Geoghegan, sinjorino Olga L* kaj multaj aliaj penis deturni min de la fondado de la Ligo, memorigis al mi la malfeliĉan sperton de la akademio Volapüka kaj la danĝeron, kiun multkapeco alportus al nia juna afero. « La paca natura vojo », ili skribis, « laŭ kiu nia afero iris ĝis hodiaŭ, estas la plej bona, kaj oni ne devas riski novaĵon, se la malnovaĵo estas bona ». — « Libere kunigitaj per la centra organo, sendependaj unu de la aliaj, ni prezentas militistaron multe pli ordan ol ĉia Ligo » — « La sola rezultato de la Ligo estos, ke ĝi ligos al ni mem la manojn » k.c... Mi sentis jam mem, ke mi faris paŝon iom danĝeran kaj eble submetas propramane dinamiton sub nia konstruo. Tamen, malgraŭ la avertoj, mi estis ankoraŭ tro optimista.... Sed bedaŭrinde la sperto montris tute alion. Apenaŭ la regularo estis presita, en nia afero, ĝis nun tiel paca kaj regula, tuj komenciĝis malkompreniĝoj, disputoj kaj malagrablaĵoj — Ne estis ankoraŭ kreitaj la oficoj administrataj, kaj jam multaj estas malkontentaj aŭ ofendiĝis, ke oni forgesis pri ili en la Ligo ; la kaso de la Ligo estas ankoraŭ malplena, kaj jam kelkaj timus, ke la mono publika estos perdita aŭ ne bone uzita.... Nun estas la demando, kion *bonan* alportis la Ligo ? ĉu ĝia utilo kovros aŭ promesas kovri ĝian malutilan ? La sperto bedaŭrinde respondas al ni : « Ne, la utilo de la Ligo ne kovris eĉ centan parton de ĝia malutilo ». —

Kompreneble post tiu malfeliĉa provo Dº Zamenhof haltigis la aferon kaj la Ligo mortis apenaŭ post naskiĝo.

Niaj amikoj kongresanoj volu atente legi kaj relegi tiun konfeson de nia majstro ! Ili volu ĝin longe pripensi kaj ne forgesi, ke homoj estas ĉiam homoj, kaj ke verŝajne la hodiaŭaj Esperantistoj estas nek pli bonaj, nek pli malbonaj ol la antaŭaj

***

Post tiu unua malfeliĉa provo, Dº Zamenhof silentis dum du jaroj ; sed la *reformistoj* ne imitis lian silentadon kaj la disputado pri reformoj en la lingvo tiel daŭris, ke konstanta rubriko sub la nomo « ŝanĝotaĵo » estis dediĉata al tiu temo en la oficiala gazeto. Fidela al la programo, laŭ kiu dum kvin jaroj la lingvo devis resti en provado, Dº Zamenhof pacience akceptis ĉiujn tiujn disputadojn en sia jurnalo.

Sed, kiam alvenis la templimo difinita, li decidis denove ekprovi fondon definitivan de Ligo.

En la nº de januaro 1893 de la *Esperantisto*, li skribas : « De la nuna jaro ni proponas tre gravan novaĵon, kiu espereble kun plena aprobo estos akceptita de la amikoj de nia afero : en ĉio tuŝanta nian lingvon kaj nian aferon, ni enkonduku konstantan voĉdonadon de ĝiaj amikoj ».

« Jam antaŭ 3 jaroj, kiel niaj amikoj memoras, ni sentis la bezonon, ke la kondukado de nia afero sin trovu kun egala rajto en la manoj de ĉiuj ĝiaj amikoj kaj ke la tuta sorto de nia lingvo dependu de la deziroj de tiuj, kiuj ĝin uzas kaj laboras por ĝi. Ni tiam ankaŭ proponis fondi Tutmondan Ligon Esperantistan, en kies manoj devus sin trovi la tuta sorto de la afero Esperanto. Sed tiu ĉi propono, per si mem tute natura justa kaj necesa, ne povis tiam efektiviĝi, ĉar la sperto montris, ke niaj fortoj estis tiam ankoraŭ tro malgrandaj kaj nematuraj por tia aranĝo..... La fondado de Ligo tiam montriĝis *tro frua* kaj devis esti *prokrastita*. Sed prokrastita ne estas forjetita, kaj jam tiam ni promesis, ke en pli oportuna tempo estonta ni al la demando pri Ligo ankoraŭ *revenos*. Nun la cirkonstancoj tute ŝanĝiĝis. Nia afero jam ne sole staras tute forte, sed tuta estas jam subtenata de niaj amikoj, ne postulante oferojn de la iniciatoro. Nun sekve venis la tempo transdoni nian tutan aferon al la libera dispono de ĝiaj subtenantoj, sen timo, ke ili lasos ĝin fali ».

Ĉu legante tiun artikolon oni vere ne kredus, ke ĝi estas *ĵus* verkita kaj ke Dro Zamenhof, konstatinte la nunan disfloradon de Esperanto, alvokas nin al unuiĝo, kiu povos progresigi la aferon ?

Post tiu alvoko, nia majstro klarigas sian novan planon.

La unua tro detalo regularo estis kaŭzo de malsukuso dum la unua provo ; tial, tiun fajon, li faris *nenian* regularon kaj fondis Ligon sen ia ajn regularo.

La Ligo simple komistis el la abonitoj de la centra gazeto « Espérantisto » kaj la ĉefa, preskaŭ sola celo, de la Ligo ŝajni esti la *reformado* de la lingvo. Ĉiu ligano povis fari siajn proponojn, sed por ium haltigi la grandan alfluon da diversaj proponoj, estis decidite ke ĉiu ligano *pagos* la enpreson de siaj proponoj kaj li enpresigus komercan reklamon. Verŝajne la iniciatoro pensis ke la liganoj faros ne nur *lingvajn* proponojn, sed ankaŭ *propagandajn* proponojn ; sed fakte oni nur disputis pri tiel diritaj plibonigoj, ŝanĝoj de la lingvo. Kontraŭ tiu nova fondo de Ligo batalis kelkaj spertaj Esperantistoj. En la aprila numero 1893, Sºj N. Borovko kaj L. de Beaufront plendis pri la senĉesa reformemo kaj avertis pri la danĝero de tiu senfrukta agado. Sº de Beaufront skribas : « objekton bonan oni ne devas tro tuŝi ; alie anstataŭ perfektigo oni alportas al ĝi nur kripligon ».

Malgraŭ tiuj saĝaj avertoj, la Ligo komencis funkciadi kaj la sperto montris ke la linganoj, malgraŭ la deziroj de Dº Zamenhof, nur sin okupis pri reformoj. Vane nia majstro skribas : « La Ligo tute ne estas kreita por *ŝanĝadi*, sed por *administradi* kaj *regadi* en nia afero » (*Esperantisto*, aŭgusto 1893), neniu administradas, neniu regadas, ĉar ŝtato sen registaro, korpo sen kapo ne povas esti regata. Oni konfuzis respublikon kun Anarĥio, kaj kredante krei Esperantistan respublikon oni nur fondis anarĥian ĥaoson.

Fine, Dº Zamenhof, tedata de la senĉesaj disputaj decidis ilin fini per solena voĉdonado de la *Esperantistaro* (t. e. de la abonantoj de la gazeto). En la nºj de januaro ĝis junio 1894, Dº Zamenhof klarigis la proponon.

La liganoj devis voĉdoni pri 3 punktoj.

1) ĉu oni devas restigi senŝanĝe la ĝistiaman formon de la lingvo ?

2) ĉu oni devas akcepti, en ĝia tuta pleneco, *novan* formon prezentotan de Dº Zamenhof ?

3) ĉu oni devas fari aliajn reformojn ?

4) ĉu oni devas principe akcepti la novan formon, sed nur fari kelkajn ŝanĝojn en detaloj ?

Sekve de tio, Dº Zamenhof donis en la suprediritaj numeroj de sia gazeto *plenan* projekton de *nova* dialekto de la lingvo, kiu, en multaj punktoj, tre diferencis de la nuna lingvo.

Ne estas loko ĉi-tie esplori ĉu tiu nova lingvo estis bona aŭ malbona.

La sola rezultato fina interesas nin.

En la numero de Novembro 1894 oni trovas la finan rezultaton de la voĉdonado :

Por punkto I — 157 voĉoj *(kontraŭ reformoj)*
« « II — 11 « } *(kune 107 voĉoj pro reformoj)*.
« « III — 3 «
« « IV — 93 «

De tio, sendispute, sekvis ke « **la lingvo Esperanto devas tute sen ia ŝanĝo resti en sia unua formo.** »

Fine la danĝerega disputado pri reformoj estis ĉesigata !!

Fine la tempo alvenis, kiam la *propagando* povis komenciĝi !

La afero estis savita, sed ne sen peno, sen doloro, sen vundo.

Kelkajn monatojn poste, en majo 1895, la rusa registaro malpermesis la eniron de la Gazeto (eldonita en Nürnbergo) en Rusujon, kaj « La Esperantisto » mortis, kaj kune kun ĝi ankaŭ malaperis la lastajn restaĵojn de la *Dua Ligo*.

CARLO BOURLET.

(daŭronta).

* Ĉiuj energiaj, lertaj kaj fervoraj propagandistoj.

Kroniko

Al Sºj Sekretarioj de Grupoj. — La Redakcio petas SS. Sekretarioj sendi kiel ebleplej rapide ĉiujn *informojn* de ilia grupo, *eltranĉojn* de lokaj gazetoj parolantajn pri Esperanto, kc. Ne nur la elspezojn postajn estos repagitaj sed plie donacojn oni ĉiujare faros al la plej regulaj kaj interesaj korespondantoj.

***

Federacio Esperantista Katalana. — Tiu societo, en ĝia kunveno ĝenerala en Barcelono la 24 de aprilo akceptis, post legado de leteroj de Sº Th. Cart, vic-prezidanto de SfpE kaj rimarkoj de Sº V. Inglada reprezentanto de HspE, la jenan regularon internan.

INTERNA REGULARO

ARTIKOLO 1. — La *Federacio Esperantista Katalana* enhavas :

1e Membrojn apartajn ;

2e Grupojn federitajn.

Art. 2a. — Membroj apartaj pagas kotizaĵon de tri frankoj aŭ pesetoj (laŭ la lando) almenaŭ al la Komitato kiu ilin provizos per prospektoj kaj broŝuroj laŭ pove.

Art. 3 — Grupoj lokaj estos fondataj ĉie kie estos utile, ili estas kondukataj per selegat j.

Art. 4a. — (Kotizaĵo). — La grupoj lokaj difinas mem sian kotizaĵon, ne malplia ol tri frankoj aŭ pesetoj, kaj manierojn ĝin kolekti.

Art. 5a. — La grupoj federitaj difinos por la federacio parton da unu franko aŭ peseto almenaŭ ĉiujare por ĉiu membro.

Art. 6a. — La Delegato por la cetero aranĝos la propagandon lokan sub sia propra respondeco kaj li povos anigi sian grupon al Societoj samcelaj, plenumante iliajn regularojn.

Art. 7a. — La Komitato devos sendi al ĉiuj membroj apartaj aŭ grupitaj membran karton, senpagan insignon kaj laŭ povo broŝurojn kaj prospektojn.

***

Katalanujo. — En la ĝenerala kunveno de la Federacio Esperantista Katalana, estis decidate proponi al la Dº Zamenhof la novan radikon « KATALAN' » anstataŭ proponitaj : *Katal'*, *Katalon'*, *Kataluny'*.

SENSPRITAĴO

SI. — Mi ĉiam portas kun mi tiun ametiston kaj tiun amuleton...

LI. — Kaj ili ne ĵaluzas ?

ŜI. — ?!?

LINGVAJ KLARIGOJ

de Dº ZAMENHOF

Ekster siaj mallongaj fundamentaj g amatikoj, Dº Zamenkof neniam publikigis, en unu verko, komentariojn aŭ klarigojn pri la sintakso de nia lingvo.

Tamen, dum kvar jaroj de 1889 ĝis 1892, kiam li redaktis la gazeton « Esperantisto » li ofte donis en la rubriko « Respondoj al amikoj » utilajn klarigojn pri la lingvo.

Kvankam kelkuj el tiuj klarigoj troviĝas jam (sed sen la cito de la deveno kaj de la originala teksto) en aliaj gramatikaj verkoj, ni pensas, ke la metoda represo de ĉiuj tiuj interesaj respondoj povas esti utila kaj ke niaj legantoj ĝin tre ŝatos.

Tiamaniere ni posedos kvazaŭ mallongan komentarion de la lingvo, verkitan de la aŭtoro mem.

Kompreneble ni ne ŝanĝis eĉ unu linion de la originala teksto.

Carlo BOURLET.

Pri la nomo de la lingvo

La nomo de nia lingvo ne estas elpensita, jen estas ĝia historio :

Eldonante la unan lernolibron de nia lingvo, mi prenis por mi la pseŭdonimon « Esperanto » ; la lingvo mem havis nenian propran nomon kaj estis nomata « la lingvo internacia proponita de Esperanto ». Pro oportuneco oni komencis uzadi la esprimon « lingvo de Esperanto » (die Esperanto-Sprache) ; aliaj esprimoj, kiujn kelkaj provis uzadi (ekzemple « la lingvo internacia », « la internacia »), montris sin ne oportunaj kaj ne enfortikiĝis, ĉar ili estis ne bone elparoleblaj, ne memoreblaj por la publiko kaj prezentis nenion difinitan (ĉar sub « lingvo internacia » oni povas egale bone kompreni la Volapükon aŭ aliajn proponitajn projektojn). Baldaŭ montriĝis, ke nur la vorto « Esperanto » (sole aŭ kun aliaj vortoj) klare diferencigas nian lingvon de la aliaj, kaj multaj amikoj komencis baldaŭ en siaj leteroj aŭ artikoloj uzadi simple la solan vorton « Esperanto », ekzemple « la afero Esperanto », « skribi en Esperanto » kc. Tiel iom post iom ellaboriĝis unuvorta nomo de nia lingvo. Vidante, ke mia komenca pseŭdonimo transiris al la afero mem, kaj ke ĝi estas tre oportuna, mi baldaŭ tute ĉesis uzadi mian pseŭdonimon, kaj ĝi restis nur kiel nomo por la afero mem. La nomo « Esperanto » estas per si mem tute senlogika ; sed en sensignifa kondiĉa nomo kial ni bezonas logikon ?

(El *Esperantisto* decembro 1890).

Ortografio

Multaj plendas, ke la skribado per *ĉ*, *ĝ*, *ĥ*, *ĵ*, *ŝ* kaj *ŭ* estas por ili neoportuna kaj malhelpas ilin ankaŭ en la presado de verketoj en iliaj lokoj, kie la presejoj ne havas la literojn kun signetoj. Ni ripetas tial tion, kio estas jam dirita en la « aldono al la Dua Libro » : anstataŭ la signeto superlitera oni povas kuraĝe uzadi la literon *h* kaj anstataŭ *ŭ* — simplan *u*.

(El *Esperantisto* februaro 1890).

Sekve de tio, *en okazo de bezono*, oni povas de skribi : kuraghe, ghi, jhurnalo, shipo, hhemio, chevalo, ankau, laudi.

RIMARKO DE LA RED.

NEKROLOGIO

La grupo Cereta, apenaŭ fondita, suferis grandan perdon en la persono de unu el siaj plej inteligentaj kaj fervoraj membroj, Soro EDMOND BAUX, kiu mortis, ĉe l'aĝo de dek ok jaroj, la 18a de Majo lasta, pro sekvoj de kruela opreacio.

Liaj kunuloj longtempe bedaŭros tiun junulon kiu estis la espero de la grupo kaj l'amiko de ĉiuj.

— La okan de majo la Esperantistoj de Rouen perdis unu tre distingindan membron de sia komitato patrona, Sron Gully, oficiron de la publik-instruada ordeno, profesoro de matematiko, direktoro de la Rouen'a observajo kaj membro de kelkaj sciencaj societoj.

— Oni anoncas la morton en Obenghé-Benghé (Memstara Kongolando) de Soro LUCIEN CHRISTIAENS, redaktoro de la *Belga Sonorilo*, je l'aĝo de 22 jaroj. Tiaj perdoj neatenditaj estu por ni incito al plej varma propagando, ĉar ni devas batali ne nur kontraŭ la malprogresemo sed kontraŭ la morto.

MANUFACTURE D'HORLOGERIE, BIJOUTERIE, CYCLES

AGRAMON

CÉRET (Pyr.-Or.) FRANCE

AUX DEUX LIONS

20 Mois de CRÉDIT aux Fonctionnaires

Marque de Fabrique

Cycles ★ ESPERANTO ★

MARQUE DÉPOSÉE

Catalogue franco — Oni korespondas Esperante

Sº JOAO ERNESTO, en **Uba**, *Minas Geraes*, **Brazillando**, desiras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn kun fremduloj.

LIBREJO L. LAMIOT

Céret — (P.-O.) — Franco

Fonetiko L tera, de M. VEREMA (*elvendita*)... 0 50

Provo de khemia nomaro de P. BERTHELOT... 0 50

Tiuj 2 verkoj estas presitaj *sen sursignoj*

ŜTOPILOJ EL KORKO

J. TRESCASES

Céret (P. O.) Franco

Le Gérant : Paul BERTHELOT.

Imprimerie Muller, 2, rue St-Jean, Perpignan.